

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerc“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsocia).

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
I. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 199
6. 7. 1924

Redakcio:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Batin, L. K.

Administracio:
Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo
po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,30 sv. fr. por landoj, kies valuto
sufiĉe malkulturne 50%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,35 dol. aŭ 0,25 sv. fr.

Anonprezo
po kvadrata-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fr. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fr.),
en „Internacia Komerc“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Franca Nacia Kongreso 1924 en Strasbourg

2-4 aŭgusto.

Strasbourg, la urbo de l' franca nacia kongreso.

Ruĝan sangstraton tra argenta kampo vidigas la blazonŝildo de Strasbourg, la urbo de la nunjara francnacia esperantista kongreso. Tiu ŝildo tenata de du leonoj estas bildo de forto kaj kuraĝo, de riĉeco kaj de sangon versaŭta milito, de ŝajnas rakonti la historion de la kongres-urbo.

Kiam Argentoratium, nuna Strasbourg, estas fondita, neniu scias. Se ni dubas pri la aserto de kronikisto, ke ĝi „pli ol milducent-jarojn antaŭ la naskiĝo de Kristo“ ekzistis, ni tamen, pripensante la favoregan lokon, volonte kredos, ke jarcentojn antaŭ la komenco de la kristana epoko en la fruktodona ebena inter la Rejna riverego kaj la riveroj Ill kaj Bruŝ estis kelta urbo aŭ urbeto.

Ne estas mirinde, ke la romanoj ĉi tie konstruis la fortikaĵon Argentoratium, de kies muroj ankoraŭ nuntempe eroj estas trovataj en la grundo de la plej malnova kvartalo. Proksime de tiu urbo la imperiestro Juliano en la 357-a jaro lasfoje venkis la germanan malamikaron.

Sed la junaj popoloj revenis, nenigis la nenueblajn legiojn, detruis la hejmaron de la fremdaj konkerintoj.

Tamen el ĝiaj ruinoj baldaŭ reestigis nova Strasbourg; la malnovaj stratoj ne povis malhavi kastejon.

Per militetoj, jen kun la kavaliroj kontraŭ la episkopo, jen kontraŭ la kavaliroj, la nobelaj rabistoj, per militoj jen kun la imperiestro, kies flagon la urba flago sekvas kiel unua kontraŭ turkoj kaj kristanoj, jen kontraŭ la imperiestro por la religia libereco, la burĝoj de Strasbourg akiris militan famon kaj havigis al si demokratian konstitucion, kiu ofte estis laŭdata kiel modela kaj eĉ post la franciĝo en 1681 daŭris ĝis 1789.

Nur la granda revolucio kaj la napoleona imperio faris Strasbourg-on urbo vere franca, tamen ne laŭ la lingvo.

Multe suferinte en la jaro 1870, ĝi estis, de 1871-1918, unu el la plej gravaj kaj fortaj urboj de la germana imperio.

De post la fino de la mondmilito ĝi denove estas franca limurbo, sed ne pli fortikaĵo.

En la „mirigebela urbo“, kiel la popolkanto ĝin nomas, la multŝanĝa historio lasis multajn postsignojn: novaj kaj malnovaj konstruaĵoj kaj monumentoj rakontas al la atenta migrulo pri ĉiuj epokoj.

Unuavice estas nominda la fama ĉefpreĝejo, la multego da statuoj kaj statuetoj kaj la mirinda astronomia horloĝo de Schwilgué. (Vi tamen ne kredu, ke la marionetoj, kiujn oni vidas moviĝi je la tagmezo, la koko kokokrianta estas la mirindaĵo! La ĉefajon, la prezentadon de la suna kaj luna kaj aliaj movadoj, la vizitantoj ĝenerale nepre malatentas.)

Mezepokaj estas ankoraŭ aliaj preĝejoj kaj domoj, turoj kaj stratoj; mi nomu nur la preĝejon de Sankta Tomas kaj la Kammezell-domon.

Pli novaj, sed (almenaŭ plejmulte) belegaj estas la palaco Rohan (Vieux Château), la Teatro kaj la Prefektejo, kaj, konstruitaj antaŭ kvardeko da jaroj, la Universitato kaj Hospitalo, la Biblioteko, la Konservatorio, la imperiestra palaco (Palais du Rhin) ktp.

Sur placo kaj placetoj ŝtono kaj bronzo memorigas la posteularon pri la jenaj:

J. B. Kleber, la fama napoleona generalo, ĉi

tie naskita, kaj J. Gutenberg, kiu en nia urbo konstruis la unuan presilon;

la tre ŝatita prefekto Lezay-Marnésia kaj Fischart, la verkinto de la „Feliĉa ŝipo“; la tri poetoj Sjöber (patro kaj du filoj) kaj la kemiisto Ch. Ad. Wurtz;

fine, ĉe la bela Universitato la germanacia monda poeto Goethe kaj la francnacia mond-

standardon ĉe la bordo de la Seine“. Hodiaŭ oni klopodas revivigi la strasburgan ŝipistaron per la konstruado de granda Rejn-haveno. Kiom malsamaj la nunaj interrilatoj je la antaŭaj! Se la jamaj vojaĝemaj ŝipistoj povus reveni, kiom ili mirus pri la rapideco de la vagonaroj, aŭtomobiloj, flugmaŝinoj, pri la telegrafo kaj la radio-telefono kaj la ĉie komprenata mondlingvo Esperanto!

Tre konata germana versaĵeto gloras la strasburgan paflegaron. Ne malfacilante tiun militan gloron, ni tamen pli fiere ĝoju pri la rolo de nia limurbo kiel interkomprenigilo de du grandaj popoloj. Mi ne lacigu vin per la nomaro de famaj profesoroj, verkistoj ktp.; sed la supre nomitaj monumentoj de Pasteur kaj Goethe memorigu nin, ke de post ĝia estigo estis la honora tasko de nia Universitato, peri al la francoj la germanan kaj al germanoj la francan kulturon. Ni esperu, ke la fama aliternejo longe ludu tiun rolon por la beno de la homaro, ke la interkompreniga festo okazota ĉi tie post multaj militaj teruroj estu pli ol pura simbolo.

Krom la supre nomitaj aĵoj estas tre vidinda la granda kolonia Ekspozicio, kiu okazos en Strasbourg je la sama tempo, kaj, en tiu kadro, la malgranda elmontrado de esperantistoj, libroj, gazetoj ktp., kiujn nia grupo klopodas kolekti. Ni esperas, ke niaj gastoj ne pentos pri la vizito al nia propagandilo, trovos ion interesan kaj senkulpigis nin, se la sukceso ne egalos nian bonvolon.

Kiu havas sufiĉe da tempo kaj mono, partoprenu la ekskurson al la monto St. Odile, vizitonte la faman monaĥinejon kaj la interesan „idolanan muron“, praan fortikaĵon. Vidinte grandan parton de nia belega hejmlando, li sendube ne bedaŭros sian vojaĝeton.

La malriĉuloj, ĉu je monbiletoj, ĉu je libertempo, kontentigos sin prononante en la „Orangerie“, la tre bela urbĝardeno, kaj je la Rejno, la fama riverego.

Trapasante la ponton de Kehl ili bedaŭrinde sciigos, ke staras ankoraŭ la obstinaj baroj inter la popoloj dividitaj.

Tamen revenante al la jama fortikaĵo, ili kun ĝojo rimarkos la maleston de la pordegoj kaj vidos sur la remparaj deklivaj ĝardenojn, kiuj kreskigas sanigajn legomojn, dolĉajn fruktojn kaj parfumajn florojn, kiuj havigas al la birdaro favoran lokon por la hejmeca nesto, kaj revigas la samideanojn pri paco kaj amo. Ejo.

Franca Nacia Kongreso de Esperanto 1924 en Strasbourg

2-4 aŭgusto.

Multaj, precipe gravaj aferoj kaŭzis preskaŭ leŝtore la prokraston de la franca nacia kongreso en Strasbourg. La Loka Kongresa Komitato decidis tion unuanime kun la direktora komitato de la S. F. P. E. en Paris, pro la jenaj kaŭzoj:

1. La kongresanaro povas ankoraŭ multe pli-grandigi ĝis la nova kongresdato.

2. La 6 julio oni malfermos en Strasbourg grandan kaj belegan kolonian ekspozicion, kaj la prokrasto permesos al ĉiuj kongresanoj viziti kune kun la kongreso tiun vidindan ekspozicion.

3. Kune kun la kolonia ekspozicio okazos Internacia Esperantista Ekspozicio (vidu ET n-o 195).

4. La prokrasto de la Nacia Kongreso ĝis la unuaj tagoj de aŭgusto permesos al la diversaj




La Universitato kun monumento de Goethe.

scienculo Pasteur, la plej famaj studento kaj profesoro de nia aliternejo.

Mi malkontentigus miajn samurbanojn, se, parolante pri la vidindaĵoj, mi forgesus la „feran homon“, antikvan armilistan elmontraron, kiun oni vidas proksime de la placo Kleber; alian strasburgaĵon, la famekonatajn cikoniojn, vi nur en montraj fenestroj kaj bazaroj serĉu! Ĉar — eble pro la plialtiĝo de la luprezoj — ili forlasis la karan urbon kaj transloĝiĝis en la kamparon.

Aŭdinte pri strasburga industrio, oni eble pensos pri la ĉi tie eltrovitaj anserhepataj past-ĉejoj, pri bongusta acida brasiko (Sauerkraut), kaj klaraj blondaj bieroj. Sendube ŝatindaj industri-ajoj!



La fervoja Rejnponto inter Strasbourg (Francujo) kaj Kehl (Germanujo).

Ni tamen ne forgesu aliajn pli gravajn! La fruktodoneco de la ĉirkaŭa grundo favoris la ĝardenistojn tiel, ke ili sukcesis havigi al si kvin rikoltojn en po du jaroj, kaj la proksimeco de la Rejno, la multnombro de riveroj kaj fosegoj (en la urbo estis antaŭ cent jaroj kvardeksepe pontoj kaj pontetoj, krom la fortikaĵoj) tiu amaso da akvo estigis fiŝkaptistan kaj ŝipistan industriojn. Kvankam la strasburgaj „maristoj“ ne eltrovis novajn kontinentojn aŭ insulojn, ili peris la komercon kun multe da eŭropaj urboj, kaj al unu el la kuraĝa aro la dankema patrurobo siarigis tombonumenton, ĉar „li la unua flirigis la urban

karavanoj el la okcidentaj landoj, ekzemple Usono, Brazilo, Anglujo, Belgujo, Hispanujo ktp., travojaĝontaj al Wien, ĉeesti nian nacian manifeston. Tiamaniere la kongreso fariĝos grava Antaŭ-Kongreso de Wien. Ĝis nun jam aliĝis ankaŭ multnombra eksterlandano, eĉ el Bulgario.

5. Krom tio la prokrasto permesas al la L.K.K. aranĝi pli bone kaj pli zorgeme la diversajn amuzojn en la urbaj ĝardenoj ktp.

6. Lastpunkte la kongreso mem gajnas pleje per la nuna ŝanĝo de la franca registro, kies novaj anoj estas multe pli favoraj al Esperanto ol la malnovaj.

Laŭ tiuj certe gravaj punktoj, la L.K.K. petas ĉiujn jam aliĝintajn kongresanojn, senkulpiĝi nin pri la prokrasto de la kongreso. Ni samtempe petegas ĉiujn esperantistajn samideanojn el ĉiuj landoj aliĝi kaj aliĝigi amase al nia kongreso!

La L.K.K. publikigis jam 3 numerojn de la kongresa organo „La Stelo“, 4-6 paĝa gazeto, aperanta monate, sub gvidado de nia fervora, senlaca samideano kaj del. de UEA s-o H. Perez.

La franca nacia kongreso okazos sub la alta protektorato de plej altrangaj personoj.

Provizora programo. (La preciza programo estos publikigata en la kvara numero de la kongresa organo „La Stelo“, kiun ricevos ĉiuj kongresanoj.)

Sabato, 2 aŭgusto:

Dum la tuta tago: Alveno kaj akceptado de la kongresanoj en la ĉefa stacidomo. Asignado de a loĝejoj.

17 h. Akceptado de la delegitaroj en la urba domo per la urbestro.

20 h. en la kongresejo „La Aubette“ interkonatiĝo

20¹⁵ h. en la sama ejo: Oficiala preloparolado sub la prezidanteco de s-o E. Jung, Prof. de matematiko en Strasburgo.

Dimanĉo, 3 aŭgusto:

8 h. (Kunvenojo estas ankoraŭ fiksita) salutkunveno, malfermo de la Kongreso, poste laborakceptado de la S.F.P.E.

10³⁰ h. Vizito de la urbo, aŭ de la kolonia ekspozicio.

11⁴⁵ h. Vizito de la mondama katedralo kaj ĝia horloĝo.

12¹⁵ h. Paŭzo por tagmanĝi, eventualaj vizitoj de aliaj vidindaĵoj.

14 h. Daŭrigo de la laborakceptado de la S.F.P.E., poste fakaj kunvenoj. Ev. ĝis 18 h. vizito de la ekspozicio ktp.

18 h. Ferme de ĉiuj laborakceptadoj.

17 h. en la salonego en la urba ĝardeno „Orangerie“ brila festeno (bankedo).

20³⁰ h. Belega koncerto en la sama ejo, per helpo de multnombraj urbaj societoj. Interparolado, sub la prezidanteco de s-o D. Eyquem.

22³⁰ h. eventuale: Iluminigo de la oranĝeria lago.

23 h. komenco de la granda balo en la sama ejo.

Lundo, 4 aŭgusto:

Laŭ la deziro de la unuaj kongresanoj: Ekskurso al monto „St. Odile“ dum la tago per aŭtomobilo, vizito de la aliaj kongresanoj restantaj en Strasburgo al la Rejnopinto, al la botanika ĝardeno, al la urbvarkialo „Malgranda Francujo“, kaj al la multnombraj aliaj vidindaĵoj.

Lundo vespere: eventuale ŝipveturado sur ŝipetoj, iluminataj per lampoj sur la rivero „l' Ile“ tra la urbo.

Adiaŭa kunveno.

Necesaj informoj:

Prezjo: Kongreskarto 8,— francaj fk.
 Helpkongresano 4,— fr. fk.
 Dimanĉa festeno ĉirkaŭ 15—18 fr. fk.
 Ekskurso al monto St. Odile per aŭtomobilo almenaŭ 30 fk.
 Glumarkoj po 100: 2 fr. fk.]

Oni sin turnu koncerne la mendon de la aliĝiloj kaj kongreskartoj kaj ĉio pri kongreso al la L.K.K. de la Franca Esperantista Kongreso, 15, rue du Maréchal Foch, Strasbourg, Bas-Rhin, Francujo.

Aliĝu do tuj, samideanoj el ĉiuj landoj!

Por la L.K.K. la propaganda komisaro Henriko Hotz, Boite commerciale 47, Strasbourg.


Fakaj kunvenoj en Strasbourg.

1. Instruistoj: Profesoro E. JUNG, 1, Quai Finkmatt, Strasbourg.
2. Poŝtistoj: S-o GRENIER, 22, Boulevard de la Marne, Strasbourg.
3. Filatelistoj: S-o MÜLLER, 1, Rue des Juifs, Strasbourg.
4. Feministoj: F-lino BRISBOIS, 62, Rue de la Forêt-Noire, Strasbourg.
5. U. E. A.: S-o FERREZ, 17, Rue des Ormes, Strasbourg-Cronenbourg.
6. Amatoroj de Senfadena Telefonio: S-o HOTZ, Boite commerciale n-o 47, Strasbourg.
7. Oficistoj: S-o BECK, Secrétaire Général de l'Association des Employés d'Alsace et de Lorraine, Rue St-Etienne, Strasbourg.
8. Studentoj: S-o FABIO GITTER, Bd. de Nancy 24, Strasbourg.
9. Pliaj specialistoj sin turnu al: S-o KIMMERLÉ, 86, Rue de la Ziegelau, Strasbourg.

II. Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso Reichenberg-Liberec.

Dimanĉe je la 10a matene la prezidanto de la L. K. K., s-o ing. G. Scholze, malfermis la solenon. Unuanime oni elektis jenan kongresestraron: prezidantoj s-o ing. Prof. G. Scholze, Reichenberg kaj s-o Direktoro Eiselt, Praha; sekret: s-o Schüller, Reichenberg kaj s-o Ginz, Praha.

Salutataj de la kongresprezidanto s-o Scholze estis: s-o D-o Spitaler, reprezentanto de la projektanta Reichenberg'a Komerca Ĉambro; s-o konsulo Elliot Sidney, reprez. de la brita konsulejo; ministria konsilanto D-o Maschner, reprez. de la politika distrikta estraro; supera polic-konsilanto D-o Zilka, reprez. de la policedirekcio; vicdirektoro s-o Erben, reprez. de la poŝta direkcio;



Strasbourg-Parta vidaĵo de la urba ĝardeno „Orangerie“ kun la rusa pavilono.

s-o Prof. Rosenberg, reprez. de la Komerca Akademio; s-o Direkt. Hampel kaj s-o Prof. Kirschnek, reprez. de la pedagogia lernejo; s-o direktoro Reinhardt, reprez. de la ŝtata faklernejo por teksa industrio; s-o distrikta lerneja inspekt. Richter, s-o instruisto Bruscha, reprez. de la Germana Instruisto-Ligo en Ĉeĥosl.; f-lino Christen, reprez. de la distrikta instruisto societo en Reichenberg; s-o eduko-konsilanto Bayerl, reprez. de societo por infanprotektado.

Delegitoj el 57 lokoj ĉeestis, kiuj parte salutas kaj bondeziras la kongreson. Entute partoprenis 180 kongresanoj anonciataj.

Salutelegramojn sendis la kongreso al s-o Masaryk, prezidanto de nia respubliko, kaj al s-ino Zamenhof.

S-o redaktoro Taubmann faris la festparoladon. Poste s-o direktoro Eiselt, Praha, festparolis. Li salutis la kongreson en la nomo de Ĉ. A. E. kaj bondeziras, admonas la samideanojn je pli vigla streĉado de ĉiuj fortoj.

Gravan efikon havas la salutvortoj de la reprezentanto de l' projektanta komerca ĉambro s-o D-o Spitaler, kiu unue en Esperanto, poste en germana kaj ĉeĥa lingvoj esprimis la daŭran favoron de l' komerca ĉambro por Esperanto. (Longdaŭra aplaŭdo.)

Solena kanto de nia himno finis la tiel festan malferman kunsidon.

Posttagmeze la laborakceptado.

Raportojn faris s-o Hromada pri Ĉ. A. E., s-o Klingler pri G. E. L., s-o Sklenčka pri UEA, s-o Ginz pri propagando (gazetservio), s-o Pitlík pri Ĉ. E. I.

Rezoluĉioj: I. proponita de la komuna laborakceptado de ĉeĥosl. ŝtatekzaminataj Esp.-instruistoj: Ĉar Esperanto helpas la popolan klerigon kaj alportas ankaŭ gravajn kulturajn kaj ekonomiajn utilojn, la II-a Ĉ. E. K. petas la registaron, enkonduki la ĝeneralan Esperanto-instruadon en la lernejoj.

II. (Propono de s-o Hromada):

II. Ĉ. E. K. aŭdinte la raportojn pri la nuna stato de la Esperanto-movado en nia lando akcentas la devon de ĉiuj samideanoj realigi la decidojn de la Geneva Konferenco kaj proklamas devo de ĉiu klubo,

1. organizi en oktobro aŭ novembro kursojn por komercistoj laŭ la propono de s-o Edmonds en Genève kaj la detala plano prezentota de la ambaŭ naciaj societoj,

2. starigi liston de komercaj kaj industriaj firmoj kaj publikaĵ oficejoj, kiuj kapablas korespondi en Esperanto, ĉu per tio, ke ili posedanto aŭ iu oficisto estas esperantisto, aŭ pro tio, ke li akiris de iu esperantisto la certigon, ke li zorgos pri ilia eventuala Esperanto-korespondado.

3. zorgi, ke per sendado de regulaj informoj al Ĉ. A. E. kaj G. E. L., tiuj ĉi du centraj institucioj posedu detalan kaj fidindan

materiale statistikan pri kunsidoj, membroj, paroladoj, oficiala instruado de Esperanto kaj pri ĉio rilatanta al nia movado.

4. aranĝi aŭtune propagandan semajnon por sisteme kaj laŭplane atentigi la plej grandan parton de siaj samurbanoj pri nia afero, por ke la kursoj estu plej efikaj.

III. (Propono de s-o Hromada):

La II. Ĉ. E. K., konsiderante la gravan laboron farotan, por kies sukceso la koncentrigo de ĉiuj fortoj estas necesa, faras alvokon al ĉiu esperantisto de nia respubliko, aliĝi al UEA kaj al nacia Esperanto-societo, ĉu senpere aŭ pere de loka klubo.

London matene fondiĝo de „Ligo de germanaj ŝtatekzaminataj Esperanto-Instruistoj“. Aliĝis ĝis nun 34. Prez. s-o Taubmann, Haida; vicprez. Prof. Murath, Dux; sek. E. Dornaus, Arnsdorf; vicsekr. f-lino Schwarzbach, Haida; kas. s-o Bräuer, Langenau; vickas. f-lino Tham, Hoheneibe; estraranoj: D-o Bilschitzky, Prag kaj s-o Prof. Süster, Saaz.

Poste komuna kunsido kun la samfaka sekcio (23 membroj) de Ĉ. E. I. Oni reciproke raportis, akceptis rezolucion kaj preparolis komunajn laborojn.

Dimanĉe vespere okazis la fest-vespero, bonege aranĝita de s-o Prof. D-o Morche, s-o arkitekto Kull, s-ino Popelik kaj f-lino Scholze.

London (9—10 matene) kunvenis 25 delegitoj de UEA kaj kandidatoj de la delegiteco por aŭdi de ĉefdelegito O. Sklenčka instruon pri la administraj laboroj delegitaj. S-o O. Sklenčka detale klarigis la administran procedon de varbado, aliĝado kaj realigo de membroj, donis utilajn konsilojn por propagando, tiel ke unu sola horo estis bonege uzita por plena agordiĝo de la laboroj delegitaj kaj la ĉefdelegitaj.

Laborkunsido de U. E. A. J. Ĉefdelegito S-o Pivl malfermis la kunsidon. Por ĝi estis elektita kiel sekretario loka del. de Reichenberg, samideano Gahr. Ĉeestis distriktelegitoj de Jičín, Reichenberg, Trebič (Moravio) kaj Leitmeritz. Por la distriktelegitoj de Trautenau kaj Bratislava funkcias s-o ĉefdelegito. Lokaj delegitoj krom la jam nomitaj urboj ĉeestis ankoraŭ el Hradec Kralove, Gablonz, Kosmanos kaj Hermannseifen.

La ĉefdelegito raportis pri historio de UEA-Junularo en Ĉeĥoslovakio kaj konstatas, ke en la ĉsl. respubliko estas la plej vigla movado.

Poste estis akceptitaj kelkaj statusaĝoj koncerne, ke ankaŭ pliaĝuloj povas aliĝi al U. E. A. J. kiel subtenantaj membroj de nia asocio.

Akceptita estas ankaŭ propono, havigi vicdelegiton en pli grandaj urboj krom la loka delegito, se la plimulto de la lokaj U. E. A. J.-anoj konsentas.

Por la Wiena kongreso estas elektita s-o Csáder el Bratislava kiel reprezentanto de l' ĉeĥoslovakaj U. E. A. J.-anoj.

Antaŭkongresa Renkontiĝo en Dresden, Aŭgusto 1924.

Ni jam sciigis, ke ni ne aranĝos lacigan antaŭkongreson, sed nur senĝenan renkontiĝon. Vizitontoj de la XVI-a, traveturantaj Dresdenon, estu kore salutataj en nia bela urbo! Por la gesamideanoj, neveturantaj al Wien, estas ĉe ni ebleco, konatiĝi kaj babilu kun en- kaj eksterlandaj esperantistoj. La programo estas la jena:

Sabato, 2 aŭgusto, vespere je la 7-a: Italienisches Dörfchen.

Dimanĉo 3 aŭgusto, matene je la 10-a: Brühlsche Terrasse, irado tra la urbo; vizito laŭvola de muzeoj aŭ preĝejoj; vespere je la 6-a: Granda ĝardeno. Carolaschlosschen.

Lundo, 4 aŭgusto, matene je la 10-a Ekspozicio de Teksajtoj; vespere je la 6-a: Loschwitz, Luisenhof, Weisser Hirsch

La anoncotaj gesamideanoj estos akceptataj en la stacidomo.

Estos ebleco, veturi mardon 6—8a per la berlina kolektivogonaro komune tra Praha al Wien. Do, ĝis revido en Dresden antaŭ la Deksesa!

Germana Esperanto Asocio Grupo Dresden.

Varbu por Esperanto en radio-sfero.

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj komplete informara, ni bezonas sceligojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administrativaj aŭ privataj sceligoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Eŭropo. Francujo.

Orientfranca Federacio: sidejo en Strasburgo.
Benfeld. Per la helpo de kelkaj samideanoj kredetle baldaŭ fondiĝos grupo.

Mulhouse. Ĝenerala kunveno okazis la 8 aprilo. La federaciaj statutoj estis aprobitaj. Samtempe la grupo aliĝis al S.F.P.E.

Reichshoffen-Ville. Kurso kun 8 lernantoj gvidata de s-o Hoj komencis la 21 aprilo. Grupo ankaŭ jam starigis.

Schiltigheim-Rischheim. Dank' al la klopodoj de s-o Hoj oni nun starigas kurson kaj samtempe grupon. La tiel samideanoj kontrabatalas energie kaj sukcese la malmultajn en Elzaso trovigantajn idistojn. Kurso estos gvidata de s-o Hoj el Strasburgo.

Strasbourg. La regiona centra movado estas sendube ĉi tie. Dank' al la agado de la kongresa komitato preskaŭ subite Esperanto disvastiĝas en la popolaro. La tuta urbestroaro favoregas nian movadon. Krom tio la deputitoj de la franca registaro el nia regiono promesis apogi ĉe la franca Parlamento projekton pri nedeviga instruado de Esperanto en la tuta lando.

Preskaŭ ĉiuj ĉefaj ĵurnaloj favoras Esperanton kaj raportas per longaj artikoloj pri Esp. kaj Esp. en Radio.

Novaj kursoj komencis ĉi tie la 3 kaj 7 mojo en la jam nuna malnova hejmo „rue Pierre Bucher“. La Strasbourga Esperantista Asocio sukcesis en tiu monato interesiĝi la „Société des Nations, Groupement universitaire Strasbourg“ pri Esperanto, kaj la grupo ricevis nun de tiu asocio belegan salomon kun apuda ĉambro en ĝia universitata domo. La nova ejo troviĝas du deponoj la 20 junio nun: Place de l'Université 1, unua etaĝo. Regulaj kunvenoj ĉiumerkrede je la 20 horo.

La poŝta adreso de la Strasbourga Esperantista Asocio estas 47, boulevard commercial, Strasbourg, Francujo.

Filatelista Klubo „Esperanto“ estas fondita; ĝia sidejo estas 15, rue du Marché Foch.

Germanujo.

Wickede bei Dortmund. S-o instr. Willi Kocks Kemper deponis maion en sia klaso, 5-a lernejo de la tiera popolernejo, instruas Esperanton. Post nun 6 instruohoroj kun plezuro li povas konstati, ke la 17 nur 10 jaraĝa gekomencantoj lernas kun ĝaja fervoro nian facilan lingvon en sia libervola 31-a instruohoro!

Polujo.

La 8 junio okazis en Bielystok solena inaĝuro de la Esp. Societo „D-o L. Zamenhof“ en la salono de la urbdomo, en ĉeesto en 100 personoj, sub la prezido de ĝia prez. s-o J. Szapiro. Ĉeestis oficialaj delegitoj de la urbestro kaj de la vojevodo (regionestro) esprimantaj siajn simpatiojn al Esp. Propagandan paroladon faris s-o advokato Litauer el Varsovio.

Rusujo.

Esperanto en Tverj.

1. Urba laboristina konferenco unuanime post raporto de k-o Varankin decidis organizi ĉe la urba virina fako esperantan rondeton. La kurso en la rondeto jam komenciĝis.
2. 7 majo okazis la ĝenerala kunveno de SEL, kiun ĉeestis ĉ. 50 homoj. La kunveno:
 - a) Konstatas, ke registaro de SEL-anoj en Tverj plene sukcesas; ĝis nun registris sin proksimume 50 homoj, el kiuj 80% — gelaboristoj, — aliaj inteligentuloj.
 - b) Plene aprobita faritan ĝin — kluban laboron (laŭvoĉa legado, biblioteko, literatura koleĝo, hor-koncerta rondeto, propaganda rondeto, infana horo, Dramondeto ĵus komencas labori. Ĝi preparas prezento „Uniformon“ kaj kune kun esp. rondeto el vilaĝo Novopolje de tverja gubernio operon „Venov Paŭlo“.
 - c) Konfirmis laborplanon por la tuta somero.
 - d) Aŭskultis raportojn de kursgvidantoj: Varankin (ĉe la Fabrika Klubo „Tekstilĉik“ kaj ĉe la urbo virina fako),

Socia vivo.

La iluzio pri la Militjuro.

De D-o Barbosa Lima Sobrinho.

D-o Sobrinho, juna sed eminenta brazila publikisto, estas redaktoro de la grava gazeto „Jornal do Brasil“. Lia reputacio estas granda precipe en la parlamenta rondeto. Li estas publikiginta diversajn librojn pri politikaj kaj socialaj temoj. La tradukinto de tiu artikolo petis de li resumon de lia verko „A Ilusão do Direito de Guerra“. Tiu artikolo estas, do, sintezo speciale farita de la verkisto mem. D-o Sobrinho ne estas esperantisto, sed lia alĝo estas tre grava por esperantismo en Brazilio. La favora aŭ malfavora opinio pri lia libro lin konvinkis pri la efektiveco de Esperanto pli ol ĉiuj aliaj diskonoj de la ideoj ol lin lingvo. Rim. de tradukinto.

La titolo de la libro estas tiu, kiu estas supre nomita: La iluzio pri la Militjuro.

Ĝi konsistas el tri partoj: unu historia, alia elmontra, kaj la tria kritika.

En la unua parto, ĝi rigerdas la plivastigon de la homaranismo en la militjuro. Ĝi komenciĝas je la antikva kaj kruela „jus belli“, modifita poste, dank' al la kreskado de la civilizacio, kies interpretitoj estis la unuaj internacjonalistoj. Dum la lastaj jarcentoj, la homaranismo fortiĝis, klarigita de la racionalistoj de la XVIIIa jarcento, kiuj alportis al ĝi la helpon de la individualismo en la ideoj de Montesquieu, Rousseau kaj Kant. Pro tio, ekpligrandigis la nombro kaj la graveco de la internaciaj kongresoj, kiuj atingis la plej grandan amplekson ĉe la konferencoj en Hagoo, kie la Homaranismo ricevis sian plej grandan kaj plej brilan konfirmon. Sekvas resumita raportoj pri la militaj leĝoj, kiel ili estis eliritaj el la ideoj pli ĵusaj. Poste, ĝi esploras kia estas, tiurilate, la atesto de la faktoj en la estintaj konfliktoj kaj konkludas: „Malgraŭ tio, malgraŭ la multenombraj esceptoj, neebligige formiĝis kono, karakterizanta la ĝeneralan tendencojn dum la lasta centjarkvarono, la enkonduko de la militjuro estis kreataj sub forta humana influo. Tamen neniu milito estis provinca ilin, por esplori ilian efektikan kaj efektivigan povon. Mankis pruvo. Tiun-ĉi kreis la politiko de militanto kaj de militpreparaĵoj, ĝin naskis la imperialismo kune kun la tendencoj ekpansiemaj ĉe la popoloj. Tiu pruvo, kruela kaj ĉimiginda, estis la eŭropa konfliktego.“

Libro II.

Pri la eŭropa konfliktego temas la dua parto de la libro, raportanta pri la militaj kondiĉoj adoptitaj de unu kaj de alia parto. Ĝi priiritas la komencojn de la batalado, la malrespekto al la neŭtraleco, la severgajn agmanierojn de la surtera milito, la teruran surmaran

Scipeczin (ĉe Vagonuzina lernejo de 2-a ŝtupo kaj ĉe la kavaleria Eskadrono), Lebedev (Profesia Klubo de Biglio), Petrov (lernejo de 2-a ŝtupo en vilaĝo Novopolje). La kurso en la plimulto de l' rondetoj estas jam finita, aŭ finata.

e) Elektis revizian komisionon.

Post la kunveno oni fotografis ĝi havis plezuron aŭskulti radio-koncerton de blindaj infanoj-esperantistoj el Moskva.

5. Gazeto „Tverskaja Pravda“ (Tverja Vero) deziras presigi seninterrompe pe tradukojn el Senn Revuo kaj Esp. Triumf. V. Varankin.

Kulturo.

Internacia Historia Kongreso.

Programo.

Internacia historia kongreso aranĝota de la Ligo de decidaj Lernejo-Reformanoj okazos la 2-4 oktobro 1924 en la burĝa salonego de la urb-domo en Schöneberg - Berlin, Rudolf Wilde-Platz. Nek la eksterlandaj nek ĉiuj germanaj parolantoj estas membroj de la Ligo. Ne temas do pri rezultiĝo de liga dogmo, sed por havigi forumon, sur kiu reprezentiga la vera historia vivo de l' nuntempo.

Ĵaŭdo, 2 okt. „Histori-filozofiaj fundamentoj.“ Malfermo je la 9/10 horo. Paul Honigsheim, profesor-aspiranto, Köln a. Rh., Huhng. 2a. „Esenco kaj Taskoj de la Sociologio.“

11a horo: Theodor Lessing, Profesoro, Hannover, Stolzestr. 47. „Fundamenta Problemoj de la Kultur-historio“

12a horo: Paul Kampffmeyer, verkisto, Berlin-Wilhelmshagen. „Ekonomia historia Teorio.“ Diskutado.

3a horo: Friß Wuessing, supera studokonsilisto, Berlin-Frohnau, Veltheimpromenade. „La Relativismo en la historia Teorio.“

4a horo: Reinhard Sireck, supera lerneja konsilisto kaj profesoro, Darmstadt, Schießhausstr. 116. „Individuo kaj Aro.“

5a horo: Siegfried Kawerau, stud-konsilisto, Berlin-Charlottenburg, Königin-Luisestr. 18. „Ŝtato, Nacio, Popolo.“

Vendredo, 3 okt. „Spegulo de l' Mondo.“ 9a horo: A. J. Grani, Profesoro, Leeds, 1 W-Fareburn Avenue, Headingly. (Parolos angle.) „Anglujo kaj Germanujo.“

10a horo: Henri Lichtenberger, Profesoro, Paris, 16 Avenue Bugeaud. (Parolos germane.) „Germana-Franca Kultur-interplektiĝo.“

11a horo: Oskar Halecki, Profesoro, Warszawa, nuntempe Genève, Société des Nations. (Parolos germane.) „Polujo kaj Germanujo.“

3a horo: Grafo Harry Kessler, Berlin W. 9, Köhner Str. 28. „Etika Mondpolitiko.“

4a horo: Abdullah Yusuf Ali, Bombay, nuntempe London S. W. 1, 9 Pall-Mall. (Parolos angle.) „Hindujo kaj Eŭropo.“

5a horo: Tsai Yuan Pei, Profesoro, Peking nuntempe Bruxelles, Légation de Chine. (Parolos angle.) „Ĥinujo kaj Eŭropo.“

8a horo: Francesco Orestano, Profesoro, Roma 34, via Brenta 2, (Parolos germane.) „La unuigita Ŝtatoj de Eŭropo.“

Sabato, 4 okt. „Instrua Praktiko.“ 9a horo: Frederick J. Gould, London W. 5, Armored, Woodfield Avenue, Ealing. „La etika Tasko de la historia Instruo.“

10a horo: Gustav Klamm, supera instruisto,

militon, la intensecon de la era milito, la konduton kontraŭ la regato kaj la proprojo malamika kaj la neegalteco de la regimo de la neŭtraleco.

Ĝi montras kiel la konfliktego reverŝis la tri fundamentajn principojn de la jus belli: la distingon inter batalantoj kaj nebatataloj, la respekto al la privata propraĵo kaj la aparigon inter neŭtralecoj kaj militantoj. Ĝi provas per tiuj fundamentaj modifoj de la militjuro la vanecon de ĝiaj sankcioj.

Libro III.

Ĝis tie, la faktoj. Alvenas la momento de la kritiko, kiuj estas farataj en la libro III, kiu estas titolita „La veroj pri la milito kaj la militjuro“. Ĝi montras, laŭ la historio, kiel neniu ŝtato, aŭ Anglujo, aŭ Francujo, aŭ Usono, povas tiurilate ĵeti la unuan ŝtonon. Kaj konkludas, en la ĉapitro unua, ke „Tuj kiam malrespekto al la internacia juro povas kunhelpi malfacilan venkon, la ŝtatoj ĝin uzas. Ĉar la venko senkulpigas tion, kiom la malvenko kondamnas kaj surferigas, sendepende de la respekto, kiun oni estas montrinta al la internacia juro.“

La 2a ĉapitro, titolita „La civilizacio kaj la militjuro“ provas ke, ĉar la milito dependas de la materialaj fakti sciencaj perloj, ĝi farigaĵas pli perforta kaj, sekve, pli barbara. proporec kiel ni progresas en civilizacio.

La 3a ĉapitro aplikante la ĝeneralan firmigitajn principojn, vidigas la malrespektojn, kiujn el unu kaj alia parto praktikis la militantoj dum la eŭropa milito. Ĝi pravigas pri tiu vidpunkto la uzadon de la subarmistoj, kio ne estas fakto nevidita en la internacia juro, kaj verigigas anglan praktikojn, en la surmara milito, malakordajn al firmaj principoj de la jus belli. Ĉiu nova uzado estas malakceptata kun abomeno. La fajro-armiloj inspiris indignon al la antikvuloj. Tio ne malhelpas, ke ili farigis necesaj, tuj kiam ili estas valoraj por ĝi la militon. Poste ĝi celas prui ke la germana agmaniero estis natura rezultato de la universa politiko. Ĝi rigerdas en unu ĉapitro la germanajn ideojn kiel ili estas deduktitaj el siaj reprezentantoj. Bernhardi, Clausewitz, Hartmann k. t. p. Kaj tuj poste ĝi priskribas la ĉefajn ideojn de la „politiko de la fortoj“ tarante ĝian historion en unu ĉapitro kaj serĉante ĝian rezultatojn en alia. La politika ekvilibrilo ne estas formulo de sistemecon, sed de agitado, la klopodo de la ŝtatoj, kiuj faras kaj malfaras samvalorecon ĉiam noperfektaĵojn ĉiam reformblajn. Por helpi tiujn necesojn, oni kreas la armitan pacon, la politikon de la militpreparaĵoj, de kiu devenas la soldatemo kaj la soldatema spirito. La ekvilibrilo-politiko estas unu el la plej fortaj minacoj al la

Dresden-Johannisstadt, Blasewitzer Str. 39. „Historia Instruo kiel Kulturo.“

11a horo: Ernst Heywang, instruisto, Gochsheim, Unter-Franken. „Historia Instruo kiel scienco pri la Homo.“

3a horo: Rudolf Friedrich, Profesoro, Hamburg 39, Scheffelstr. 14. „El la Praktiko de la Hamburgaj Lernejoj.“

4a horo: Otto Tacke, studokonsilisto, Steffin, Steinstr. 6. „Fremdlingva Instruo, nacia Eduko kaj Internacismo.“

5a horo: Siegfried Kawerau. „Kosmopolito, Eŭropano, Germano.“

Diskutado. Finparolado.

Monsendoj por la kongreso al s-ro Carl Schubert, Berlin S. 42, Buckower Str. 5, Poŝt-ĉeko: Berlin, 19349. — Demandoj koncerntaj la aranĝon de la konferenco (kun resenda kosto) al D-o Siegfried Kawerau, Berlin-Charlottenburg, Königin Luisestr. 18, I — Demandoj pri loĝado por la konferenco al s-ino studokonsilisto Lydia Stöcker, Berlin-Friedenau, Offenbacher Str. 5; Telefono: Rheingau 1786.

(Laŭ n-o 5 de „Die neue Erziehung“ [„La nova Edukado“], informilo de la Ligo de decidaj Lernejo Reformanoj, eldonejo C. A. Schwetschke & Sohn, Berlin W. 30.)

Scienco.

Astronomio.

Spektr-analizo.

Spektr-analizo estis ĝis nun ekskluzive uzata por astronomiaj observoj. Per ties helpo ni informiĝis pri la kvalito da astraj materioj. Nun ĝi ludos gravan rolon ĉe la legado de manuskriptoj per okulo ne plu deĉifrebla. Ekzistas lumradioj, kiuj ne plu estas rimarkeblaj por la homa okulo (ultra-violeta-kaj ultraruga lumoj). Faktaj pravas en Francujo la uzeblecon de la spektra analizo ankaŭ por praktikaj celoj. J. M.

Literaturo.

Universitataj prelegoj pri pola literaturo en Roma.

Antaŭ kelka tempo okazis ĉe la universitato en Roma (Italujo) la unua prelego pri pola literaturo de Prof. Pollak. Malferme parolis la dekano de la filozofia fakultato Prof. Nicola Pesta. La priliteraturaj prelegoj okazas ĉiuvendrede; temo de la unuaj prelegoj estas: Mickiewicz, la plej granda pola poeto. La malferman prelegon ĉeestis krom multaj oficialuloj itala kaj pola publiko.

Pola Esp. Servo, Bydgoszcz.

Mineralogio.

Olefontoj en Ameriko.

En Ameriko okazas nun granda superproduktado de oleo, ĉar oni trovis kelkajn milojn da novaj fontoj. La sumo de ĉiuj fontoj estas kelkcentmil. Oni foruzas jare pli ol 100000 milionojn da litroj. En Ameriko oni nomas oleon „fluanta oro“ kaj fakte ĝi valoras por niaj maŝinoj pli ol oro. J. Major.

Stenografio.

Stenografistoj laŭ Stolze-Schrey.

Samstenografianoj kaj speciale adeptoj de la Esperanto-alfaro Stolze-Schrey-Schneeberger en ĉiuj landoj estas petataj sendi tuj sian adreson por grava afero al Redaktoro R. Kreuz, Red. de ET, Horrem b. Köln. Urĝa!

mondpaco. Estas necese ĝin anstataŭigi, ĝin detru, kiel diris dum la milito kelkaj sagacaj ŝtatestoj. Sed kiu estos la anstataŭinto de la ekvilibrilpolitiko? La germanoj de 1914-18 konsideris grava la militarismon. La usonanoj imazis Ligon de Nacioj, kiu estus etika nur, se ĝi limigus multpove la principon de regneco de la ŝtatoj. Ni estas devigitaj, antaŭ tiu frakaso de la anstataŭinto, ĉi tiu necesaj la ekvilibrilpolitiko kaj la krueliga rezultatoj, kiujn ĝi alportas, la soldatemon kaj la militon. Ĉu ne estas iu alia rimedo? La pacifistoj parolas pri arbitracio kaj enketaj komisionoj. La libro pravas, kiel oni ne povas konfidi al tiu du malfirmaj rimedoj, kaj studas poste la socialistejn ideojn, kiuj ne solvas la militproblemon, tial ke ili akceptas la batalon, kiel batalon de klasoj. Ĝi raportas ankoraŭ pri la bolŝevista regimo, rigardata de tiu vidpunkto. Kiam la teoritistoj konsideris tiun neeviteblecon de la milito, ili intencis deteni ĝin, tial ke ne estas eble ĝin eviti. Starigis, do, la militjuro. Oni pravas en unu ĉapitro „la sendefekco de la militjuro“, kiu rezultas de ĝia propra karaktero de juro trudiĝi de unu ŝtato. Kiam ĝi ne taŭgas al la aliaj, kial ili ĝin respektoj? La angla mara juro estas juro kreita por servi la necesojn de la bria imperialismo. Ĉar Britujo estas tre potenco, ĝi povas altrudi al la mondo la leĝojn, kiuj taŭgas al ĝi. Tuj kiam iu ŝtato povas kontrastadi ilin, estas klare ke ĝi havos nenian moralan skrupulon, kiu ĝin regos.

Ni persistas, do, antaŭ sentima malbono, kiu estas la milito, katastrofo tiel granda, ke ni ne sukcesas ĝin limigi, nek doliĝi. Ĉu ni devas kruciĝi la brakojn kaj lasi ĝin laŭvole? Ne, estas necese kontrabatali ĝin. Kiel? Per la individua edukado, kreante la spiritoŝtatan malamikajn al la milito.

Krom la nesuperblaj lecionoj de Normann Angell, estas necese profii, en tiu edukado, ion de Heroŝ, direktanta la patriotismojn al saĝa kaj justa maniero, kiu ne impikos mallaŭdon, malestimon aŭ malamon al la landoj de la aliaj. Supre de ĉiuj regionaj aŭ patriotaj sentoj devas brili la lumo de la daŭra justeco, gvidanta la popolon, kiu vivas pace nur kiam la sola ambicio, kiu lin direktas, estas la ambicio de la justeco kaj ne la avido de la grandeco kaj de la povo. Ĉar en tiu ambicio nur ekzistas amoj kaj en tiu ĉi avideco estas malamo, estas perforto, estas malboneco. Ĉu tio ĉi estas franca idealismo? Ne, ĉar estas laŭ tiu mem direktita la konsilio de la intereso, por ke la popoloj povu eviti la militan katastrofegon. El portugala lingvo tradukis C. Aug. Domingues, Rio de Janeiro.

Sporto.

Skolta movado.

Esperanto en la servo de skoltoj

La 23 aprilo 47 bukreŝiaj skoltoj alvenis en Konstantinopolo sub la gvidado de s-o D-o Aleksandro Dumitrescu, komandanto de la ekskurso. La eksterlandaj skoltoj estis akceptitaj ĉe la haveno de siaj turkaj kolegoj. Al la bonveniga parolo de s-o inspektoro Samy Bej, turka skoltestro, respondis s-o Prof. Traian Georgescu, bukreŝia skoltestro. La interkomprenigo inter la diversnaciaj skoltoj okazis per Esperanto, interpretita persinjoro D-o Ali Fouad Bej, hon. ĝen. inspektoro de Saneco en Turkujo, kaj Tiberio Morariu, instruanto — skoltestro el Bukreŝti.

La fremda skoltgrupo, dank' al la afableco de s-o Safvet Bej, direktoro de Publ. Instruado, estis tre gastame akceptata kaj logigata. Dum la oktaga restado en Konstantinopolo, la rumanajn junulojn tre bone kondukis iliaj turkaj fratoj de moskeo al moskeo, al muzeoj, insulo Prinkipos, Skutari, Heider-Paŝa, ktp. La diversnaciaj junuloj rapide interamikiĝis, jen interŝanĝiĝis la skolt-insignoj, jen la koroj.

La Esperanton nesciantaj skolt-knaboj envie rigardis siajn kelkajn kolegojn facile interparolantajn per la universala lingvo, kaj ankaŭ la rumanoj, ankaŭ la turkaj skoltoj prezentis peton al siaj estraroj pri aranĝo de esperanta kurso, por la plifaciligado de estontaj ekskursoj.

La 1 majo ensipiĝis la ekskursintoj kaj la larmoplenaj okuloj de la rumanaj knaboj, la adiaŭ-svingoj per la elfalditaj, longaj, ruĝaj skolt-zonoj, la entuziasmaj „hip - hip - hura“ o resonantaj ĉe la kajoj — elokvente atestis la neforgeseblajn impresojn akiritajn en la bela, gast-ama Respubliko Turka. *R. R., Konstantinopolo.*

Filatelio.

Filatelio en Ruslando.

Eksterlandano ne sufiĉe bone prezentas al si filatelian movadon kaj interŝanĝo-procedon per filatelieja materialoj, kiuj ekzistas en Sovetlando. Jen kelkaj informaj linioj.

1. Interŝanĝo per poŝtmarkoj kaj papermono kiel filatelieja materialoj estas en Unuiĝo de Sovetaj Socialistaj Respublikoj (S. S. S. R.) objekto de la ŝtata monopolo. Tuta enspezo rezultianta el tiu monopolo estas utiligata por helpo al la loĝantaro (vilaĝanoj kaj laboristoj), suferintaj pro la malsatego, ankaŭ por la institucioj, zorgantaj pri la infanoj.

2. La personoj, kiuj deziras pro filatelia celo fari interŝanĝon per p. m. kaj papermonoj kun privataj personoj en S. S. S. R., devas adresi la filatelian materialojn ekskluzive al „Reprezentanto pro filatelio kaj papermono en S. S. S. R., Moskva, 1-a Tverskaja-Jamskaja, 3, aldonante ĉiujfoje nefermitan koverton kun la adreso, laŭ kiu estas direktota la sendaĵo.

3. Estas permesate sendi filatelian materialon por sumo de ne pli ol 2000 fk. laŭ la prezoj de la katalogo Yvert kaj Tellier, kaj ne pli multe ol 10 ekzemplerojn de ĉiu marko kaj tutaj, konsiderante ĉiujn variaĵojn de poŝtmarkoj kaj tutajoj kiel memstarajn ekzemplerojn.

En Moskva kreiĝis centro de internacia unuigado de la filatelistoj-laboruloj (ne komercistoj), kiu decidis uzi Esperanton kiel sian ĉefan oficialan lingvon. Estas eldonita n-o 1 de la oficiala organo „Radio de Filatern“ en Esperanto, anglaj, franca kaj germana lingvoj. Prezto: 10 cendoj, kiujn oni povas sendi per cirkulantaj puraj poŝtmarkoj laŭ la adreso „Moskva, 1-a Tverskaja-Jamskaja, 3. — La Soveta Filatelisto“. Laŭ la sama adreso oni sendu en Esperanto diversajn informetojn, gratulojn okaze de oficiala utiligo de Esperanto-praktikado en la tuta mondo por diversaj celoj ktp. Precipe la filatelistoj mem ne prokrastu sendi siajn korespondojn nur en Esperanto, ĉar de tio dependas plua kaj definitiva enradikiĝo de Esperanto kiel lingvo oficiala.

Centra Komitato de S. E. U.

J. V. Polakov.

Poŝtkesto n-o 600

Jugoslavio.

La provizo de la nuna trafikantaj poŝtmarkoj estis preskaŭ elĉerpita, kaj la novaj markoj menditaj ĉe eksterlanda firmao ankoraŭ ne estis alvenintaj. Tial okazis kelkaj surprisoj. Aperis denove, jam en 1923-a uzitaj pm.: 1 din. sur 10 paraŝoj-invalida-marko, 1 din. sur 25 paraŝoj (invalida eld. 1921). Nove eldonitaj estas: 1 din. sur 15 p. inv., kaj 3 din. sur 15 p. inv., 20 paraŝoj sur 60 paraŝoj, 5 dinaroj sur 8 dinaroj, ankaŭ de la nuna serio, busto de la reĝo Aleksandro. — La novaj poŝtmarkoj ĵus alvenis, kaj oni atendas ilian baldaŭnan transdonon al la trafiko. *Br. R.*

Diversaĵoj.

Lastaj Novajoj.

Filmo-raporto de Jos. Major, Budapeŝt.
Ameriko posedas 4000 milionojn da dolaro en oro. Pli ol la duono de la oro en la mondo

troviĝas en norda Ameriko. Tial la diversaj opinioj pri dolar kontraŭindinoj ne havas bazon.

Bukedon de 25000 floroj ricevis s-ino Gordon, prezidantino de virina societo en Ameriko. Ŝajne la amerikanoj konkuras ĉie.

En Nordameriko oni vendis 15 milionojn da golfpilkoj en 1923.

Pereĝinta kontinento estas kovrita per la aŭstraliaj oceanoj. Ĉe la Pacifista Sciencia Kongreso en Sydney zoologisto pentris interesan bildon pri la ornitologio, floro kaj faŭno de tiu ĉi „Antarktikio“.

En Insulo Samoa oni inaŭguris detrubatalon kontraŭ la danĝera moskito-muŝo. Ĉar oni ĝis nun ne trovis kuracilon aŭ medikamenton kontraŭ la de ĝi kaŭzita febro, oni nun klopodas mortigi mem la kaŭzanton. *J. M.*

Esperanto-Hejmo Göppersdorf.

Al nia hodiaŭa numero estas aldonita spektro pri la projektita Esperanto-Hejmo en Göppersdorf. Atentigante niĝajn legantojn al tiu ĉi entrepreno, ni rekomendas trege la subtenon de vere serioza kaj akcelinda plano.

Poŝtkongreso Stockholm.

Samideanoj, kiuj vizitos la poŝtan kongreson de Stockholm, estas petataj informi pri travolaĝo s-on Charles Petersson, Poŝtfako 34, Mjölby. S-o Petersson estas preta akcepti kaj gvidadi samideanojn. Ĉiu volanta devas nepre halti en Mjölby (250 km de Stockholm).

Kora invito.

Konstanta Blindukongresa Komitato.

La blinda esperantistaro tutmonda kore invitas siajn vidantajn samideanojn viziti multnombro de la kunsidojn de la kvara internacia blindulesperantista kongreso, kiu okazos samtempe kun la Deksesa en Vien.

La blindukongresaj kunsidoj nunlare okazos en la ĉefkongresloko kaj ne, kiel la pasintajn jarojn, en la blindulinstitutoj, tiamaniere, ke ĉiu vizitonto de la Deksesa havos okazon facile viziti kaj partopreni la laborriĉajn kunsidojn de la nevidantaj fratoj.

Precipe ni atentigas pri la unua ĝeneralkunveno de la „Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj (Uabe)“.

Varmkore petas vian simpatian por la blindulesperantista movado: Konstanta Blindukongresa Komitato. *Joseph Kreiß, sekr.*

Kongreskaravano Berlin-Wien.

2-a sciigo.

La veturprezo en la 3-a klaso de rapidvagonaro Berlin—Wien trans Dresden—Prag estas 27.— ormk. La rabato koncedita de la aŭstria fervojo por la kongresanoj jam estas konsiderita. La rabato konsistas el la permeso uzi rapidvagonaron de la ĉeĥa-aŭstria limstacio Gmünd ĝis Wien paginte nur la prezon por simpla vagonaro. La diferenco estas do ĉ. 150 ormk.

Estas tre rekomendinde aĉeti vojaĝkajereton entenante biletajn por al- kaj reveturo. Tia kajereto valoras 60 tagojn kaj povas esti kunmetata laŭ plaĉo de mendinto por ĉiu ajn kaj re-vojaĝo komenciĝanta de ĉiu ajn loko en Eŭropo. Mendoj pri tio estu transsendataj ĝustatempe al la subskribinto. Ili estas plenumataj de la mondkonata „Mittel-europäisches Reisebüro“ Berlin W. 9, Potsdamer Bahnhof, kun kiu la subskribinto jam interrilatis pri tio. Partoprenontoj de nia kongreskaravano, kiuj intencas, uzi post la kongreso alian revojaĝon, estas petataj montri sian postkongresan vojaĝon akurate laŭ la fervojaj linioj uzotaj de ili. Ĉiu mendo estas zorge plenumata. La alsendo de la vojaĝkajereto okazos per registrita letero plej malfrue unu semajnon antaŭ la ekveturo de la mendinto el lia urbo. Gekongresanoj en- kaj eksterlandaj ne partoprenontaj nian karavanon estas petataj same aĉeti vojaĝkajereton ĉe la suprenomita trafikoficejo en Berlin. Mendojn faru ili en Esperanto sub la titolo „Esperanto-kongreso en Wien“. Sammaniere ili postulu la prezon de la vojaĝo, aldonante respondkuponon.

Cefdelegito de UEA, Teritorio Berlin
Max Blankenheim, Berlin-Steglitz,
Stubenrauchplatz 5.

Alvokoj.

Laborista Ligo Esperantista en Ĉeĥoslovakio atentigas gesamideanojn en Germanujo, Belĝujo Anglujo kaj Francujo, ke nia hon. prez. kamarado Jozefo Pech forvojaĝos en monato julio al London. Dumvoje li intencas viziti (ni nur citas eble) Nürnberg — Bruxelles — Ostende — London. Revenante hejmen je la fino de monato julio li

vizitos Paris. La grupoj, kiuj volas aŭ intencas fari propagandajn paroladojn de nia nelacigebla propagandisto, bonvolu skribi tuj pri ĉiuj detaloj al Laborista Ligo Esperantista en Plzeň, „Peklo“, Ĉeĥoslovakio. La temoj: Kiel propagandi Esperanton inter laboristaro. — Pri belajtoj kaj mirindaĵoj de Ĉeĥoslovakio kun 200 belege kolorigitaj lumbildoj al la temo. — Pri ĉefurbo Praha kie okazis la XIII-a Esp. Kongreso. — Popola vivo, kostumoj, historio, konstruaĵoj, natura beleco de Tatra kaj Karpata montaro, ktp. — Paris-anojn ni petas skribi rekte al London laŭ adreso: Jar. Koudelka, ĉefredaktoro, 1. Nottingham Terrace, — Regents Park, London N. W. 1.

Laborista Ligo Esperantista en Ĉeĥoslovakio, centro Plzeň

Al tutmonda samideanaro!

En aŭgusto de tiu ĉi jaro ni intencas aranĝi esp. propagandan ekspozicion, kiu estos partoj memstara de tufgimnazia ekspozicio dum solena malfermo de nova gimnazia konstruaĵo, la 23 ĝis 24 aŭgusto 1924. Samideanoj, helpu al ni propagandi nian ideon inter studentaro, sendu laŭeble tuj al ni konvenan materialon! Ne forgesu nin. Ni ĉion rekompencos! Ĉion bonvolu sendi al J. Kopecky (Stud Esp. Rondeto), Panskástr. 8, Rychnov n. Kn., Ĉeĥosl.

Helpu al propagando en Armenio!

Post ne longe mi veturos en mian hejmlandon kaj tie daŭrigos mian antaŭan propagandon por Esperanto. Seriozaj samideanoj estas petataj sendi al mi propagandilojn, presajojn, foir-spektitojn, gazetojn, kartojn ktp. por ekspozicio kaj personaĵo varbado. Sendu ĉion al nuna adreso: G. Sevak, Nikolajevskaja 56, Tiflis (Georgio).

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉigo, edziĝo, morto, okazomaĵoj, gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) sen p. g. e. Aliaj anoncetoj, nur akceptitaj por minimumo du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭpago. Abonantoj, ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkonto, ĝuas por ĉiu anonceto preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.— mk., prefera prezo por postabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

NEKROLOGO. Mortis la 1. 6. 24 fervora, entuziasma s-ano Mieczyslaw Borucki en Bydgoszcz (Polo), en aĝo de nur 22 jaroj. Longiara membro de „Socio Esperanto“, li ofte ankaŭ praktike helpis la societon kiel presisto, adepto de gutenberga arto. Lia optimisma bonkaraktero restos en nia datira memoro.

DANKESPRIMO. J. Pech, honora prezid. de Lab. Ligo Esp. en Ĉeĥoslovakio, veturinta de Italio al Daŭmacio, esprimas sinceran dankon al ĵugoslavaj ĝenerantistoj, por ilia afab kaj samideana akcepto. Speciale dankas al delegito de UEA s-o D-o Dusan Maruzzi, por plenumo de lia petita servoj kaj referiĝo en lia loĝejo dum duoran koran dankon al sekretario de ŝtata fervoja direkto por bona servo kaj al sekretario de Sudslava Esp-Servo s-o Ilja Puholo kiu oferis tutan tagon kiel bona gvidanto kaj informanto pri ĉiuj mirindaĵoj tra belega urbo Zagreb. Tion saman li esprimas al s-o Mihajlo Marković, modelisto, Sarajevo, Bosnio, por lia bona akcepto, dum sia vojaĝo tra lando.

POPULAR-SCIENCA VERKISTOJ! Ni decidis apertigi malgrandajn popularsciencajn verketojn: havante manuskriptojn bonvolu vin turni al Eldonejo „Esperantista Voco“, (por. Salo Grenkamp-Kornfeldt) Jaslo, Polujo. [1] BONA KAJ NOBLA FAMILIO EN TIRNOVO. Bulgarujo, deziras ĉiujn servistojn kiu scias kudri kaj bone kuiru. Oni preferas hungaran aŭ germanan fratilinojn. La deziranto okupi tiun ĉi oficon skribu je adreso: Ivan G. Nikolov, fotografisto, Tirnovo, Bulgarujo. [1]

SAMIDEANOJ TUTMONDAJ HELPU! Por aranĝi en nia loko esperantan ekspozicion ni bezonas esperantojn kiujn ajn. Redakcioj tutmondaj sendu al ni 2 numerojn de ĉiu gazeto, kiujn ni, dezirante, pagas. Samideanoj, se vi helpas, ni sukcesos. Sendu al: Beverwijkia Laborista Esperantista Grupo „Frateco“ Oossumburgstr. 18, Beverwijk ij Haarlem, Holando. [2]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o P. Medem (Kaunas, Litovujo) forveturas kaj petas gesamideanojn prokrasti korespondadon ĝis mezo de septembro. [2]

Deziras interrilali kun XVI-a kongresontoj pri spertoj faritaj je propagando-ekspozicioj, petas jam nun doni informojn, statistikojn ktp. dankas antaŭe por alsendota ekspozimaterialo. Th. Kuzlii, Esperanto-Librejo, St. Gallen-O., Svislando. [1]

F-ino Madeleine De Ruysscher, Groote Markt 15, Lokeren (Belĝujo), deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. poŝtkartoj. [1]

Membroj de Soc. Esp. Gr. „Nia Ideo“, Antwerpen, deziras korespondi kun ĉiulandaj esp. laboristoj; pri ĉiuj temoj, precipe pri laborista movado, Respondo certa. Skribu al sekr.: A. Van Kerckhoven, 22 Kortie Ypermansstr., Antwerpen (Belĝujo). [1]

S-o Georgi Z. Atanasov ulica „Carska“ n-o 48, Petric, Bulgarujo, deziras korespondi kun ĵugaj gesamideanoj el la tuta mondo per letero kaj il. pk. [1]

Josef Klug, Niederhermannsfein, 14, apud Arnau, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kaj interŝanĝi il. poŝtkartojn, leterojn kaj Pm. kun la tuta mondo. Se oni sendos il. poŝtkartojn, oni donu la afrankon en diversaj poŝtmarkoj por propagando. [1]

Mi deziras korespondi kun 14-15jaraĵ studentinoj de mezlernejoj. F-ino Henriette Warner, Wien XVII, Schulthessgasse 3/19, Aŭstrio. [4]

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo, precipe kun kolektantoj ruslandaj. Giustiniano Sciarretta, Termini (Italujo). [1]

S-o Francisko Dudas, policoficejo, Szerb-utca 5, II, deziras ricevi el ĉiuj ajn lando 100—200 diversajn poŝtmarkojn nedifektitajn kaj neperfortajn kontraŭ samkvanto. [1]

Kontraŭ 2 sviz. fk. aŭ egala valoro 10 divers. franc. kaj litov. Memelpoŝim, kaj 20 divers. germ. pm. Fritz Zylke, Lyck, Ostrpr., Germanujo. [1]